aton, oni tuj komprenas, kial ŝi ne laŭdis *lian* talion."

"Do jam ni faras progreson" li daŭrigis sinkontente. "'*Ni ĝin sciis*' tio kompreneble aludas la ĵurintojn. '*Al ŝi nur unu, du al li, Tri, kvar al ni li donis*' jen kion li faris disdonacante la tortojn."

"Sed" kontraŭdiris Alicio "la daŭrigo montras ke '*ĉiuj venis re al vi.*'"

"Kaj jen ili" triumfis la Reĝo, montrante sur la tablon. "Nenio povas esti pli klara pruvo ol tio. Ankaŭ tion ĉi atentu: '*Dolor' vi for, ekkriis ŝi.*' Ĉu vi, mia kara, (turnante sin al la Damo) ne ordonis ke la Loro estu for? Tamen, jen li sidas!"

"Certege" kriis la Damo, kaj furioze ĵetis kontraŭ la Loron grandan inkujon.

La inkujo trafis — ne la Loron — sed Bil Lacerton. Tiu jam de longe ĉesis skribi per la fingro, ĉar li ne sukcesis fari per ĝi markojn; sed nun la kompatinda besteto laboreme rekomencis la fingroskribon, uzante la inkon, kiu gutfalis de lia vizaĝo.

La Loro tute ne atentis la inkujon; li nur ĝentile klinis sin antaŭ la trono kaj majeste marŝis for.

"*Doloro for!* Do, Loro, for!" la Reĝo ripetis per speciale atentiga voĉo, kaj cirkaŭrigardis la ĉeestantaron kun afabla rideto.



Sekvis tre embarasa silento. F
devis anonci "Mi faris ŝercon"
korteganoj aplaŭdis amase.

"La ĵurintoj konsideru la verdikt
Reĝo, jam la dudekan fojon!

Ĉi tiun fojon la Damo interro
ne" ŝi diris "ni havu unue la juĝ
poste la verdikton."

"Vi parolas sensencaĵon" laŭte d

"Senkapigu ŝin" kriegis la Da
plej alta voĉtono.

Tamen neniu ekmovis sin!

"Mi ne timas *vin*" diris Alicio (ŝi
ĝis sia normala alteco). "Vi ja
——nenio krom ludkartaro!"

La tuta kartaro tuj suprenleviĝis
kaj ree flugfalis sur ŝin. Ŝi eli
krieton duone timan kaj duone k
forfrapi ilin kaj——

——trovis sin kuŝanta sur la d
la fratino vartis ŝian kapon sur la
forbrosas kelke da sekaj folioj fa
arboj sur ŝian vizaĝon.

"Vi vekiĝu, Anjo, vi vekiĝu, ka
fratino. "Vi ja tre, tre longe dorm

"Ho, mi estas sonĝinta tian kurio
diris Alicio.



LEWIS CARROLL *La Aventuroj de Alicio en Mirlando* Esperanto translation (Illustrated by Brinsley Le Fanu) LONDON, 1910 THE BURST